# EKO 2021
## Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok jaroj, depost 2013
2020: rekorda jaro: kun 60 komunikoj
Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

EKO 2021-17 sendita el Budapeŝto la 4an de majo.

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

# AMO persiste pluiras – eĉ jubilee

En EKO 15 en raportis pri AMO 73, okazigota en la 30a de majo kunlabore kun nia komerca faka asocio IKEF. Depost tiam ni luktegas defini la plian programon. La rezulto estas ankoraŭ ĵelea (la asignitaj numerigoj post 73 malcertas), kaj la seminarioj estos pure retaj aŭ hibridaj.sed jen la nunaj rezultoj.

**AMO 72:** Okazis. SMG prizorgis: apr 10. Irano, "Ŝtopi la digojn".

**AMO 73:** Kadre de IKEF majo 30 (dimanĉo). Temo: “Komerco favoru esperantistojn.” Nova kunlabora partnero por AMO.
**AMO 74:** Kun UEA en la Virtuala Kongreso: julio 22 (ĵaŭde). “Kiel altiri pli da junaj membroj tra Eŭropo”. Kunlaboro kun TEJO strebata.
**AMO 75:** Kun Greziljono Du tagoj inter 26 kaj 29 julio. Temo: "Kulturo pere de Esperanto". Ĉiu kultura branĉo bonvena!
**AMO 76:** Kun ILEI en la Kongreso Benina (aug 7-14): du temproponoj:
"Kursoj kaj edukaj programoj por needukistoj"
"Efika instruado tra Afriko"
**AMO 77:** Kun la kantfestivalo en Vroclavo, Pollando 11a septembro (sabato). Temo: “Ni ne perdu junulojn kaj pliaĝulojn dum la kvarentena tempo”

IKEF Internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio

Jam urĝas difini pli precizajn programojn. Tuj kiam eblos, ni konigos tion. Sinproponoj por kontribuontoj bonvenas ĉe la redakcio de EKO. Ni laboregis por doni al UEA la jubilean seminarion 75, sed ĝis nun tio ne sukcesis. La asigno havintus sencon, ĉar la unua AMO-seminario organizita kadre de UK okazis en Lisbono en 2018 kaj akiris la simbolan numeron AMO 50. Evidente, ankaŭ AMO 100 apartenus al UEA.

# Kiel prezenti al UEA ideon aŭ projekton

Pri efikaj rimedoj por meti proponojn antaŭ UEA, la CO kaj la Estraro, tamen ĉiuj rajtas en kiu ajn momento skribi al estraro-2019-kaj-observantoj <estraro-2019-kaj-observantoj@googlegroups.com> - efektive tion ni anoncis pasintjare por MondaFest' 2020 kaj kelkaj skribis rekte al ni, la Estraro. Krom tio estas publikaj niaj kontaktoj ĉe https://uea.org/asocio/estraro - do konkreta maniero ion proponi pli bone estus pere de tiu kontaktado. Pri CO same: https://uea.org/asocio/oficistoj.

Fernando Maia, vic-prezidanto de UEA

# ESF komunikas: interlingvistoj ĝoju

La blogo de Esperantic Studies Foundation regule informas. Ekzemple:

## Informilo por Interlingvistoj (IpI) en Esperanto):

Trovu la novan numeron kaj pli fruajn numerojn ĉe: http://www.esperantic.org/eo/publikajoj/ipi/

La limdatoj por kontribui al IpI kaj IfI estas la 30a de julio, la 30a de septembro kaj la 31a de decembro. Facilas registri vin por ricevi ĝiajn komunikojn, kiuj estas dulingvaj (Esperante, angle)

# Vikipedio – ni celas 300 000 artikolojn

Post ILEI en IPR 2021/1 Gazetara Komuniko de UEA numero 946 (24 apr.) klarigas la projekton. UEA partnere kun ELiSo (Esperanto kaj Libera Scio), ILEI kaj E@I alvokas vin al verkado en la Esperanta Vikipedio por komune atingi 300 000 artikolojn ĝis julio 2021. Mankas malpli ol 5000 artikoloj. Kontraŭ nur 3 EUR eblas akiri la manlibron "Vikipedio por vi: kiel ĝi funkcias, kiel vi kontribuas" (katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=8113). La tuta vikipedia projekto disponeblas jam en pli ol 320 lingvoj, kun pli ol 330 000 aktivaj uzantoj kaj pli ol 56 milionoj da artikoloj.

La teamo de Eo-vikipedio

### La Kolonja Esperanto-Klubo invitas: Redaktu vikipediajn artikolojn!

2021-05-08 (sabato) 18:00h UTC = 20:00h en la mezeŭropa somera horzono (UTC+2)


Ni prezentas enkondukon en la teknikon de vikipedia redaktado je simpla nivelo, por ne-spertuloj. Surekrane vi vidos: kiel korekti erarojn; kiel plivastigi ekzistantan artikolon; kiel krei novan artikolon surbaze de jam ekzistanta alilingva artikolo

Aliro al la zoma konferenco (ekfunkcias 10 minutojn antaŭ la komenco): https://us02web.zoom.us/j/81629504522?pwd=TjVjVnMzdTBLaWJlUWNuZVo5TkxIdz09

Antaŭanonco de via partopreno ne nepre necesas, sed estas dezirata, laŭeble en la paĝo de EventaServo https://eventaservo.org/e/KEK-invitas-2021-05-08 aŭ retpoŝte al <KDL<ĉe>gmx.eu>.

# Ekvadoro konigas sin moderne

Pluraj landoj tra Latin-Ameriko rimarkinde progresas en la kontaktado de junuloj. Jen la plejlasta ekzemplo, en lando, kie neniam estis ĝis nun forta movado.




### <Landa Parad’> plia agad’.

. La Amerika kontinento nun ĝuas aktualigitajn versiojn de la du koncernaj regionoj por <Landa Parad’>. La ĝisdatigoj okazis inter februaro kaj marto de 2021. La du regionoj estas ‘Latin-Ameriko’ kaj nova regiono ‘Pacifiko’ kiu kunigas Aŭstralion, Kanadon, Meksikon, Nov-Zelandon kaj Usonon. Tiuj raportoj estas legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe <aktivulo.net> sub la rubriko ‘Landa Agado’. La cetera mondo estas ĝisdata ĝis novembro 2020. La giganta tasko aktualigi Eŭropon ekis jam marte, kaj la unua enketilo eliris en la 27a de aprilo. Sekvas dissendo al kvar landoj ĉiutage, sekve ni nun atingis pli-malpli la duonon de la landoj. La unuaj landoj (alfabete) bonege kaj rapide respondis, la postaj malpli. Ni informos vin, kiam legebla estos Eŭropo 2021.

**=== vortoj: 725 ===**

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝisla fino de marto 2021 (per EKO 2021-12).. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.